

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

26-a Jarkolekto * Marto 2010 * N-ro 87

ISSN 1576 - 0618



Linares, raŭka voĉo eliras el ter-interno

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

(esperanto14@ono.com)

Kunlaboris ĉi-numere: Liba GABALDA, Luis José SÁNCHEZ,

Julio HERRERO SEGURA.

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
15-a Andaluza Kongreso de Esperanto	7
<i>Mil Naŭcent Okdek Kvar kaj Esperanto</i>	10
La Koro de Skota Reĝo en Andaluzio	13
Internaciaj Esperanto-Asocioj	
<i>Esperanta Jura Asocio</i>	15
Lingva Angulo	17
6-a Azia Kongreso de Esperanto	19
Paĝoj pri nia Historio:	
Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio	22
Turismi en <i>LINARES</i>	26
Krucvortenigmo	30
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio	31
Andaluza Kuirarto	33
Libro-Servo	35
Flamenko	36
Alvoko al la Ĝenerala Kunsido de AEU	38

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



➤ MALAGO

Uzi la internacian lingvon dum vojaĝoj eksterlanden, okaze de ferioj, estas tre utila afero, ĉi tiel oni konas pli bone la vizitatan landon kaj la vojaĝo fariĝas pli interesa. Nia malaga samideano Luis José SÁNCHEZ, okaze de vojaĝo en Germanion, kontaktis kun kolonja esperantisto, S-ro Harald SCHMITZ. Ambaŭ interparolis pri siaj travivaĵoj en la lernado kaj uzado de esperanto, kaj



komprenoble pri multaj aliaj aferoj, kaj ĉiam apud *kölsch*, tipa biero de Kolonjo.

S-ro SCHMITZ estas instruisto pri la angla kaj pri matematiko ĉe Gimnazio en Kolonjo kaj li regas perfekte la internacian lingvon. Sur la foto aperas, de maldekstre dekstren, Luis José SÁNCHEZ, Harald SCHMITZ kaj Juan

Carlos ANAYA, kolego de nia malaga samideano.

➤ FEJSBUKO (*Facebook*)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jam havas propran Fejsbukan grupon, nomita tiel *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*. Nun la membroj, simpatiantoj aŭ simple tiuj kiuj interesiĝas pri esperanto, havas renkontiĝejon kie havigi kaj ricevi informadon kaj travivaĵojn en rapida kaj interaktiva maniero. Oni povas facile trovi ĝin ene de Fejsbuko, klavante sur la serĉilo: *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo* aŭ *Asociacion Andaluza de Esperanto*.

➤ KORDOVO

Eldonita de Esperanta Jura Asocio, kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, aperis la 9-a numero de *JURA TRIBUNO INTERNACIA*, la jura bulteno de la Esperanto-Movado. La revuon oni prezentis dum la Universala Kongreso de Esperanto kiu okazis en Havano (Kubo). Sur la revuo aperas informoj pri la jura asocio kaj du eseoj pri juraj temoj, la pola D-ro Bronislaw KIERES verkis artikolon pri "Elementaj Informoj pri Historia kaj Nuntempa Pola Jura Sistemo", kaj la bulgara Dimitar HAGIEV verkis pri "Leĝo por Juĝado de la Homoj, la unua antikva bulgara kaj slava jura monumento". Aperas ankaŭ praktikaj ekzemploj kaj esperanta vortaro pri la kontrakto pri aĉeto kaj vendo, jurisprudenco de la Eŭropa Justica Tribunalulo kaj fine, kvar mallongaj informoj pri gravaj juĝoj aprobitaj en Germanio, Hindio, Nov-Zelando kaj Japanio.

Se Vi laboras ĉe juraj medioj kaj Vi deziras ricevi pliajn informojn pri Esperanta Jura Asocio kaj pri ĝia revuo, bv. adresi al: esperanto14@ono.com

➤ MALAGO

Somero estas bona epoko por esperantaj renkontiĝoj, ĉar multaj homoj ferias kaj vojaĝas eksteren. Jen la kazo de du italdevenaj esperantistinoj: Laura kaj Paula BRAZZABENI, kiuj vizitis Andaluzion la pasintan monaton julion. En Malago ili renkontiĝis kun la loka esperantistaro, kun kiuj ili afable kunparolis kaj trinkis, kaj kompreneble ili rakontis pri sia vojaĝo kaj sperto en Andaluzio.



Malagaj geesperantistoj trinkas, kaj kompreneble ankaŭ parolas, en esperanto kun italaj vizitantoj en tipa trinkejo.



➤ KORDOVO

- La municipa entrepreno AUCORSA (*Urbaj Kordovaj Aŭtobusoj Anonima Societo*) ĵus ekigis kampanjon kun la celo danki la uzadon de la publikaj servoj al la utiligantoj de la aŭtobusoj en la urbo Kordovo. Tiel, la entrepreno fiksas alĝuaĵojn ĉe la aŭtobusoj mem kun la vorto "DANKON" en diversaj lingvoj. Unu el tiuj afiŝetoj diras "DANKON: idioma esperanto". Andaluzia Esperanto-Unuiĝo tuj sendis dank-leteron al la aŭtobusa municipa entrepreno.



DANKON*

idioma:esperanto

- Sur pasinta numero ni jam informis pri la okazigo de ekspozicio en Kordovo montranta la antikvajn poŝtkartojn de la fotografisto Rafael SEÑAN. Nun tiu ekspozicio fariĝis libro eldonita de la kordova ŝparkaso CajaSur. Ene de la libro aperas la biografio de la fotisto kaj ankaŭ granda nombro el la poŝtkartoj de li eldonitaj. Sciate, ke li aperigis en kelkaj el la poŝtkartoj dediĉataj al kordovaj monumentoj la tekston en la hispana kaj en esperanta lingvoj. Verŝajne li estis la unua eldonisto en la mondo uzanta la internacian lingvon en poŝtkartoj. Kompreneble sur la libro ĵus eldonita aperas kelkaj el tiuj poŝtkartoj kun la teksto en esperanto.



Postales Andaluzas

RAFAEL SEÑAN Y LA FOTOGRAFÍA TURÍSTICA

(1804-1911)

➤ BIBLIOTEKOJ

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo iniciatis ankaŭ kelkaj jaroj la kampanjon "Esperanto en Bibliotekoj". Dank'al ĝi nuntempe pli ol 200 bibliotekoj disponas pri libroj en la internacia lingvo, ĉefe la libro-metodo de esperanto verkita de la Akademiano Miguel Gutiérrez Adúriz. Antaŭ kelkaj monatoj AEU petis la kunlaboradon de siaj membroj kaj simpatiantoj cele al donacado de literaturaj verkaĵoj en esperanto al andaluzaj bibliotekoj. Oni proponis la aĉeton fare de unuopuloj de unu aŭ kelkaj el ĉi tiuj libroj:

- "Sanga Nupto" de Federico García Lorca.
- "Platero kaj Mi" de Juan Ramón Jiménez.
- "La familio de Pascual Duarte" de Camilo José Cela.
- "Astura Bukedo" de diversaj asturaj verkistoj.
- "Sentempa Sinfonio" antologio de hispanaj poemoj tradukitaj de Fernando de Diego
- "Poeto de l' Popolo", antologio de poemoj de Miguel Hernández.
- "La Stultaj Infanoj" de Ana María Matute.
- "Suzana kaj la ĉasistoj de muŝoj" de Pío Baroja.

Post la malmultekosta aĉeto, la aĉetanto mem elektis la biblioteko, publika, urba, universitata, gimnazia, lerneja aŭ kvartala, ricevunta la libro(j)n.

Dank'al la malavara donaco de la membroj kaj simpatiantoj de nia asocio deko da andaluzaj bibliotekoj, ĉefe de Malago, Granado kaj Kordovo, jam ricevis tiujn literaturajn verkaĵojn en esperanto. Dankon al ĉiuj kunlaborantoj nome de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.



15-a
ANDALUZA KONGRESO DE ESPERANTO
Jaeno, 30-a / 31-a oktobro 2010

Sidejo: Junulara Restadejo de Jaeno Str. Borja JAENO

PROGRAMO

Sabaton la 30-an de oktobro:

Ekde la 10-a horo: Akceptado de kongresanoj, disdonado de la dokumentaro, interkona mateno, projekciado de esperantaj muzikvideoj.

10:30-a horo, se nia ĉina samideano ricevas la oficialan vizon de la hispanaj aŭtoritatuloj, malfermo de la ekspozicio pri esperantaj filatelaĵoj far Cao Xiongling, prezidanto de Nanchang-a Esperanto-Asocio.

11:00-a horo: Malfermo de la libroservo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

11:30-a horo: Malfermo de la Kongreso. Bonvenigo far la Loka Komitata Kongreso. Salutvortoj de la AEU-Prezidanto kaj de la Delegitoj de la Esperanto-Asocioj de andaluzaj urboj. Sinprezento de eksterlandandoj partoprenantaj la Kongreson.

12:00-a horo: Paŭzo, senpaga refreŝigaĵo.

12:15-a horo: Prelego *"La Andaluzia Esperanto-Domo"*, fare de Karmela San Segundo kaj Julio Herrero.

13:00-a horo: Prelego *"Miaj travivaĵoj kun Esperanto"*, fare de Higinio Martínez kaj Luis José Sánchez.

13:45-a horo: Tagmanĝo en la kongresejo.

16:00-a horo: Projekciado de esperanto filmo.

16:00-a horo: Prelego *"La procezo pri la olivoleo-produktado"*, fare de Jordi Lietor.

17:30-a horo: Projekciado de teatraĵo.

18:00-a horo: Prelego *"Esperanta Naturamikaro"*, fare de Julio Herrero.

18:45-a horo: Promenado kaj vizito tra la urbo.

Dimanĉon la 31-an de oktobro:

Ekde la 10:00-a horo: Viziteblaj la ekspozicio kaj la Libro-Servo.

10:30-a horo: Prelego *"La Mistera Jaeno: La Sankta Vizaĝo kaj la Belmezaj Vizaĝoj"*, fare de José María Rodríguez.

11:30-a horo: Prelego kaj Debato pri *La Lengua Internacional en la Educación Intercultural*, fare de Fabián Jiménez.

12:30-a horo: Projekcio de teatraĵo en esperanto.

13:00-a horo: Prelego *"La Esperanto-Movado en Demokratia Respubliko Kongo"*, fare de Futi Pierrinot.

13:45-a horo: Tagmanĝo en la kongresejo.

16:00-a horo: ĝenerala Kunsido de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

17:45-a horo: Amuzaj rakontetoj, fare de Esperanta Klubo Aksariko de Velez-Malaga.

18:15-a horo: Spektado de mallonga(j) filmo(j) subtradukita(j) en esperanto. Hispanlingva debato kun ĝia direktoro J.M. Asensio, de Linareso (Jaeno).

19:15-a horo: Fermo de la Kongreso kaj elekto de la venontjara kongresurbo.

19:30-a horo: Promenado kaj vizito tra la urbo.



15-a Andaluza Kongreso de Esperanto
Jaeno

historio, estas bona ekskuzo por viziti
Jaenon kaj ĝian belegan katedralon.

J.M.R.H.

15a Andaluza Kongreso de Esperanto

Jaeno, 30a, 31a oktobro 2010

ALIĜILO

Nomo kaj Familia Nomo: _____

Adreso: _____

Urbo _____ Poŝtkodo _____

Retadreso _____ @ _____ . _____

Telefono: _____ Fakso _____

Elektu Vian kotizon:

A) Baza kotizo : 20 €

Decidu ĉu Vi loĝos ĉe la kongresa restadejo

a) Tranoktado en dulita ĉambro la noktojn de la 30a kaj 31a (sabato kaj dimanĉo)

b) Tagmanĝoj de la tagoj 30a kaj 31a (sabato kaj dimanĉo)

Prezo entute = 60 €

aa) Tranokto en dulita ĉambro la nokton de la 30a (sabato)

bb) Matenmanĝo de la 31a (dimanĉo)

cc) Tagmanĝoj de la tagoj 30a kaj 31a (sabato kaj dimanĉo)

Prezo entute = 40 €


Kalkulu la kotizo-kvanton: kotizo + restado.

Pagu la kotizo-kvanton en la jena bankokonto: BBVA 0182 4106 71 0207160717
pagoj el eksterlando : IBAN ES81 182 4106 7102 0716 0717 Swift Kodo:
BBVAESMM

Mil Naŭcent Okdek Kvar kaj Esperanto

 José María Rodríguez

“Mil Naŭcent Okdek Kvar” estas mondfama sciencfikcia verkaĵo kies aŭtoro George Orwell verkis en la jaro 1948. El la du lastaj ciferoj inversigitaj naskiĝis la titolo de la romano. La libro baldaŭ famiĝis kaj ĝi vivis novan gloran epokon en la jaro 1984, kiam oni reeldonis en multaj lingvoj pro la koincido inter la titolo kaj la jaro. Eĉ oni realigis filmon bazita sur la libro.



Eble Vi konas la rakonton, la libro devancas la epokon de la titolo, ĝi priskribas revatan teruran estontecon, kie la homaro vivas malliberigita de totalisma politikaj reĝimoj. Estas necese diri, ke George Orwell ekverkis dum la jaroj kiam naskiĝis en Eŭropo la reĝimoj faŝismaj, naziaj kaj komunismaj. Orwell luktis ĉe la hispana civila milito kontraŭ la faŝisma reĝimo, sed samtempe li kritikis la stalinan komunisman reĝimon de Sovet-Unuiĝo. Tion li faris en la jaro 1945, okaze de sia verko “*Animal Farm, a Fairy Story*” (*Bestofarmo* en sia esperantlingva traduko). Do, oni povas aserti, ke la brita aŭtoro malamis ĉiajn totalismajn reĝimojn, ĉu dekstrulaj, ĉu maldekstrulaj, kaj pri ĉiuj ili parolas la libro.

En ĉi tiu verko oni pritraktas la malverajn informojn de registaro, kies celo estas subpremi la tutan enloĝantaron, pere de “modifitaj informoj”, de kompleta cenzuro kaj ankaŭ pere de edukado kie la libera pensado kaj eĉ la privateco estas tute malpermesita, kaj ĉi ĉio sub la regado de *La Granda Frato*, la unusola gvidanto kiun ĉiuj devas ami, respekti kaj obei, kvankam sur la libro neniam oni certigas, ke li reale ekzistas, do eble temas pri ideo reprezentanta la povon mem.

La lingvo estas ankaŭ efika rimedo por kontroli la popolon. Tiel, se la vorto *malobei* ne ekzistas, do la ideo mem ne akcepti la ordonojn de la granda frato ne povas ekzisti, same rialte la malfeliĉon, se oni forigas ĉi tiun vorton el la vortaro, ĉiuj estos feliĉaj. Do, estas necese por la gvidanto de la socio krei lingvon konvena por la subpremado de la popolo, kaj tiu lingvo nomiĝas *Newspeak* (Nova Lingvo).



La Granda Frato rigardas vin

Kvankam ne ekzistas tute fideblaj pruvoj pri la jena aserto, ja oni povas diri, ke por idej la lingvon *Newspeak*, George Orwell baziĝis en la lingvo esperanto. Ja, kurioza aserto, ĉu ne? Tio signifas, ke por krei lingvon celanta subpremi la enloĝantaron, Orwell pensis pri lingvo ekzistanta, kies ĉefa atingo estas certigi la liberajn kontaktojn inter personoj de la tuta mondo, spite al landlimoj, politikaj reĝimoj, rasoj, ekonomiaj sistemoj, religioj, ktp. Do, kiel povis okazi ĉi tio?

En la jaro 1927 George Orwell vojaĝis en Parizon por viziti sian onklinon, Nellie Limouzin. Dum tiuj jaroj Nellie estis la am-kunulino de Eugene Adam, fervora esperantisto fondinto de SAT kaj pli konata en la esperanta mondo kiel *Lanti*. La lingvo esperanto estis la enhejma komunikilo de la paro. George Orwell vojaĝis en Parizon ne nur por viziti sian onklinon sed ankaŭ por plibonigi sian regadon de la franca lingvo. Li suferis ĉi-sence, grandan elreviĝon, ĉar verdire li ne povis aŭdi ĉe sia onklino eĉ ne unu solan vorton en la franca lingvo, sed ja en esperanto. Krome, *Lanti* klarigis al li, ke esperanto ne estis nur lingvo sed ankaŭ

ideologio. Estas necese diri, ke George Adam, *Lanti*, estis maldekstrula esperantisto favora al la disvastigo de esperanto inter la laboristoj kiel rimedo por atingi la definitivon liberigon de ĉi tiu socia klaso, li estis ankaŭ la fondito de SAT, kontraŭnaciisma tutmonda asocio. Sendube, kiam post kelkaj jaroj George Orwell pripensis estontan socion, kie la gvidantoj subpremis la popolon ankaŭ pere de la uzo de la ĉiutaga lingvo, li memoris, ke ekzistis lingvo, kaj post ĝi supozeble ideologio, kvankam la senco de ĉi tiu lingvo estis tute kontraŭa al tiu pripensita de la aŭtoro por la libro.

Kaj se paroli el la gramatika vidpunkto, la bazo de *Newspeak* ne estas esperanto, sed baza angla, simpligita formo de la angla kreita de Charles Kay Ogden. George Orwell kontaktis kun ĉi tiu lingvo dum la dua mondmilito, kiam li laboris ĉe la BBC. La brita registaro estis interesita pri la disvastigo de Baza Angla, kaj tiel oni apogis la elsendon en Baza Angla ĉe ĉi tiu radioelsendejo. George Orwell interesiĝis pri aliaj internaciaj lingvoj, kaj tiel en la jaro 1943 li skribis por la gazeto *Manchester Evening News* recenzon pri la *Interglossa*, pere de kiu Lancelot Hogben sciigis pri sia lingvo-projekto, kio montras ke li sciis ankaŭ pri tiu lingvo.

La vortoj en *newspeak* povas esti klasifikitaj laŭ tri grupoj:

Vortoj A) temas pri vortoj de komuna uzo, ekzemple *manĝi*, *trinki*, *akvo*, pere de ili oni povas esprimi la plej bazajn ideojn kaj kompreneble post ili kaŝiĝas neniam politika aŭ filozofia ideo.

Vortoj B) temas pri vortoj konstruitaj por esprimi politikajn ideojn. La celo de *la granda frato* estis kontroli la pensadon de la parolantoj kiam oni uzas ĉi tiujn vortojn. Ekzemple *goodsex* (bonasekso), kun la signifo "ĉasteco", kiam la parolanto uzas ĉi tiun vorton ripetas la ideon, ke la bona seksa agado estas la ĉasteco.

Vortoj C) Vortoj ekskluzive sciencaj aŭ teĥnikaj sen danĝera signifo.

Fina Informo: La esperantlingva traduko de "Mil Naŭcent Okdek Kvar", farita de Donald Broadribb legeblas en interreto ĉe la ttt-paĝo:

<http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20orwell,%20george%20-%201984.pdf>

LA KORO DE SKOTA REĜO EN ANDALUZIO

Dank'al mondfama filmo estas konata la historio de William Wallace, pli konata kiel *Braveheart*, al kiu la anglaj soldatoj, ankoraŭ viva, elŝiris lian koron kaj ili forĵetis ĝin al la hundaro. Tio provokis la koleron de ĉiuj skotaj klanoj, kiuj elektis la Dukon de Carrick, Robert Bruce, nova skota reĝo, en la jaro 1306 ĉe la Abatejo de Scone. Post koni la nomon de la nova reĝo la angloj murdis la fratojn de Robert Bruce kaj ili ankaŭ malliberigis malhonore lian fratino.



Rajda Statuo de Robert Bruce
en Bannockburn

La nova reĝo kaŝiĝis de la anglaj soldatoj kaj tiam li trafis teruran malsanon: la lepron. Tiutempe oni pensis, ke la lebro, krom malsano, reale estis Di-puno. Pro tio la skota reĝo pensis, ke Dio punis lin, ĉar li estis mortinta ĉe preĝejo, do sankta loko, al alia kandidato al la skota reĝa trono. Por peti la Dian pardonon li promesis lukti kiel kruc-soldato en la Sankta Tero. Sed li ne povis plenumi sian promeson, malgraŭ tio li luktis dum tiuj jaroj kontraŭ la

angloj, al kiuj venkis en la jaro 1314 ĉe Bannockburn, tio certigis la skotan sendependencon dum kelkaj pliaj jaroj

En la jaro 1329 la skota reĝo forpasis. Ĝuste tiam li atendis la Papan Dekreton pere de kiu la Sankta Sieĝo agnoskis lin kiel reĝo de Skotlando. Sur sia morto-lito li petis al siaj plej proksimaj soldatoj ke, post sia tuja morto, elŝiri lian koron kiu devus resti por ĉiam tie kie oni luktas kontraŭ la malamikoj de Kristo, ĉi tiel li plenumus sian promeson lukti kiel kruc-soldato.

La soldatoj ĵuris plenumi la lastan deziron de la ĵus forpasinta reĝo. De Skotlando la soldatoj, sub la ordonoj de James la Nigrulo, iris en Flandrion kaj de tie, per ŝipo, ili venis en Sevilon. La kastilia admiralo Jofré Tenorio akceptis

okupita de la islamoj, sieĝis la soldatoj de la kastilia kristana reĝo Alfonso la 11-a. La granada emiro, Muhammad la 4-a, sendis sian plej prestiĝan generalon, Ozmin-ibn-Abi-Lulá, por defendi la urbon, kiu dank'al ĉirkaŭferma manovro, sukcesis venki la skotojn dum la lukto. Preskaŭ ĉiuj ili mortis, kvankam la kastilia reĝo prenis la urbon post kelkaj tagoj.



Monolito en Teba (Malaga provinco)
memoras la heroan morton de la
skotaj soldatoj

Tiuj malmultaj skotoj kiuj transvivis la batalon revenis en Sktolandon. Ili metis en la abatejo ĉe Melrose la malplenan relikvujon kie antaŭe estis la koro de la skota reĝo, kiu por ĉiam restis en Teba, tie kie li deziris.

La venonta numero de *GAZETO ANDALUZIA* (n-ro 88-a) aperos koincide kun la 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, kaj ĝi utilis kiel Kongreslibro de la jara renkontiĝo de la andaluza esperantistaro.

Internaciaj Esperanto-Asocioj

ESPERANTA JURA ASOCIO

En la jaro 1906 la fama franca Advokato MICHAUX, unu el la ĉefa organizantoj de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer, fondis la Internacian Societon de Esperantistaj Juristoj. La celo de ĉi tiu faka asocio estis renkontigi la esperantistaron dediĉanta al juraj aferoj kaj krei pere de la internacia lingvo, aferajn rilatojn inter juristoj.

Dum la unuaj jaroj preskaŭ 200 juristoj aliĝis al la nova asocio kiu eldonis la oficialan organon *LA REVUO*. Alia grava eldonaĵo de la asocio estis la "Esperantista Jurista Vortaro" en la jaro 1932. La dua mondmilito finigis ĉi juran asocion.

ESPERANTA
JURA
ASOCIO



En la jaro 1957, okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en Marsejlo (Francio), la konata samideano Ivo LAPENNA proponis la fondiĝon de nova jura asocio, tiam naskiĝis la Internacia Esperantista Asocio de Juristoj (IEAJ). La

asocio daŭris ĝis la jaro 1987 kaj ĝia ĉefa motoro estis S-ano LAPENNA, pro tio eble la propra asocio mortis kiam ankaŭ forpasis ĉi tiu prestiĝa esperantisto en la jaro 1987. La asocio eldonis la prestiĝan revuon *Internacia Jura Revuo*, aperanta unu aŭ du-foje en la jaro, aperis entute de 36 numeroj.

Sed la juraj geesperantistoj ne rezignis ne-havi juran fakon en la movado. Tiel nur du jaroj post la malapero de IEAJ naskiĝis Esperanta Jura Asocio (EJA). La celoj de la asocio estas informi juristojn pri Esperanto, apliki Esperanton sur ĉiuj juraj kampoj kaj kontribui siafakte al edukado por tutmonda konscio. La asocioj renkontiĝas ĉiujare okaze de la Universala Kongresoj de Esperanto, kie okazas serio da prelegoj organizataj de EJA pri juraj aferoj.

Alia agado de la asocio estas la eldonado de la revuo *Jura Tribuno Internacia*, aperanta unu aŭ eĉ du-foje en la jaro. Oni devas elstari, ke la eldonado de la jura revuo estas ebla dank'al la kunlaborado de nia Andaluza

Esperanto-Unuiĝo, kiu kuneldonas la juran voĉon en la esperanto-movado. EJA organizas renkontiĝon kadre de la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kaj foje ĉe la lando okazanta la universalan kongreson oni organizas viziton al jura instanco de tiu ŝtato. Venontjare la renkontiĝo de EJA-anoj okazos en Kopenhago (Danio), kaj oni ricevis inviton de la Supera Tribunalulo de Danio por organizi viziton al tiu tribunalo.

Ekde la lasta ĝenerala kunsido de EJA la prezidanto estas la hispana D-ro Rafaela URUEÑA ALVAREZ, eks-profesoro pri Internacia Juro en la Universitato de Valjadolido. Krom la revuo EJA ankaŭ emas eldoni librojn pri juraj temoj. Antaŭ kelkaj jaroj aperis la esperantlingva traduko de la "Kodo de Hamurabo", tempas pri unu el la plej antikvaj jurkodoj (1.700 a.K.). Estontece la jura asocio planas eldoni esperantan juran vortaron.

EJA ankaŭ havas propran TTT-paĝon, ĝi estas alirebla en la adreso: www.esperantajuraasocio.ueuo.com Tie oni povas ricevi kaj peti pliajn informojn pri la jura asocio de la esperanto-movado.

humoro



Lingva Angulo

La Propozicio ĈU

En esperanto ordinare la demando estas esprimata pere de la propozicio *ĉu*, kvankam demando ankaŭ povas rezulti el simpla tono per kiu la frazo estas prononcata, sed pli normale oni uzos *ĉu*, aŭ unu el la demandaj tabelvortoj (Kiam? Kiel? Kial?...) por komenci demandon. Ĝenerale la demanda propozicio *ĉu* oni tradukas en la hispanan per "¿Acaso...?"

Tiel: *Ĉu vi studos esperanton?*

¿Acaso estudiarás esperanto?

Aŭ pli normale la propozicio *ĉu* eĉ oni ne tradukas, tiel el la antaŭa frazo ni atingos jenan hispanlingvan tradukon: *¿Estudiarás esperanto?*

Se ekzistas duobla demando ni ne devas ripeti la demandan propozicion, tiel: "*ĉu vi obeos kaj studos la lecionon?*". En ĉi tiu frazo ni vidas, ke oni demandas pri du malsimilaj aferoj:

- a) *ĉu vi obeos?*
- b) *Ĉu vi studos la lecionon?*

Tamen, oni uzas nur unufoje la propozicion *ĉu*. Tiel ni neniam diru:

Ĉu vi obeos kaj ĉu vi studos la lecionon?

Same okazas se la demando ne temas pri du malsimilaj aferoj, sed pri unu ideo kaj la kontraŭa, ekzemple:

Ĉu vi havas aŭ ne havas monon?

Neniam diru: *ĉu vi havas aŭ ĉu vi ne havas monon?*

La propozicion *ĉu* oni ne uzas ĉiam por komenci demandon. Tiel, ĝi ankaŭ povas agi kiel konjunkcio se ni proponas en la frazo du paralelajn propoziciojn. Ĉi-kaze ni uzos *ĉu* dufoje, neniam izolite. Ni vidu ekzemplon:

Ĉu pro timo, ĉu pro fiereco, li nenion respondis.

Bien por temor, bien por orgullo, él no respondió nada.

En ĉi tiaj frazoj, povas ekzisti dubo pri kiam uzi *ĉu...ĉu...;* *jen...jen..!* *aŭ...aŭ...* Ni vidu:

Ni uzos *aŭ...aŭ...* kiam oni permesas elekti al la aŭskultanto unu el ambaŭ propozicioj. Ekzemple:

Informu pri tio aŭ al via patro aŭ al via patrino.
Informa de eso o a tu padre o a tu madre.

La parolanto volas diri, ke estos necese informi pri io, tamen la aŭskultanto mem devas elekti informi aŭ al la patro aŭ al la patrino. Tio estas, ekzistas certeco pri la persono al kiu oni devas informi, do oni ne povas informi al la avo, al la frato, al la onklo... Tute certe oni devas informi al la patro aŭ al la patrino, tamen la aŭskultanto devas elekti.

Se oni uzas *jen...jen...* ni diros, ke unufoje okazas io kaj aliffoje alia afero. Ekzemple.

Li estas jen gaja, jen furioza.
Él está unas veces alegre, otras furioso.

Tio estas, laŭ la momento li iufoje estas gaja, aliffoje furioza.

Ni uzos ankaŭ *ĉu...ĉu...* kiam ekzistas du eblecoj kaj la elekto de unu aŭ alia estas indiferenta, ĉar la rezulto ĉiam estos sama, ekzemple:

Ĉu pluvos, ĉu malpluvos mi iros en Kadizon.
Llueva o no llueva iré a Cadiz.

Do, malgraŭ ambaŭ opcio proponita, tio estas la vetero pluva aŭ malpluva la rezulto ĉiam estos, ke mi iros en la urbon Kadizon.

Laste, ni vidu komunan eraron en hispanlingvaj esperanto-parolantoj, uzi *se* anstataŭ *ĉu*. Ni vidu jenan frazon: *No sé si podré ir a Almería.* El laŭvorta traduko ni atingus: *Mi ne scias SE mi povos iri en Almerion.* Tamen, la ĉi tiea uzo de *SE* estus erara, ĉar oni devas uzi *ĉu*.

La frazo devus esti: *Mi ne scias ĉu mi iros en Almerion.* Tio estas, ekzistas dubo pri mia vojaĝo en tiun urbon. Oni uzos *SE* kiam ekzistas kondiĉo por plenumi la vojaĝon, sed ne dubo. Ekzemple: *Mi iros en Almerion se vi akompanas min, se ne mi ne scias ĉu mi iros.* (Yo iré a Almería si tu me acompañas, si no, no se si iré).

Do, ne konfuzu la duban *ĈU* kun la kondiĉa *SE*.

6-a AZIA KONGRESO DE ESPERANTO



Liba GABALDA



Kutime oni konsideras la internacian lingvon esperanto kiel esprimilo de eŭropaj personoj. Oni diras kaj tro multe oni ripetas, ke temas pri eŭropdevena lingvo kaj ke ĝi tute ne estas akceptata en aliaj partoj de la mondo. Ekzemploj kiel la disvastigo de esperanto en Azio estas klara ekzemplo ke esperanto estas Universala Lingvo, ne nur eŭropa. Pripensi ke 200 personoj renkontiĝis en lando antaŭe izolita kiel Mongolio, por praktiki la Zamenhofan

Lingvon pruvas, ke la tuta mondo havas efikan komunikilon ja neŭtrala kaj internacia: esperanto. Nia amikino Liba GABALDA, partoprenanto en tiu kongreso sendis al ni la jenan raporton.

De la 19a ĝis la 23a de junio okazis en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio, la 6-a Azia Kongreso de Esperanto. La kongresa temo estis "*Azia harmoniigo per Esperanto*". Ĝi altiris precipe azianojn, sed partoprenis ĝin ankaŭ kelkdeko da alikontinentanoj. 24 entuziasmoj alvenis per la Tra-Siberia Ferfojo. Entute la eventon ĉeestis pli ol 200 kongresanoj el 27 landoj. Mankis nur afrikanoj. La kongresejo troviĝis en luksa kvinstela hotelo Ĉingis-Hano proksima al la ubocentro.

La kongreson organizis KAEM (Komisiono pri Azia E-Movado) kun loka esperantistoj. En la kunsido de KAEM estis elektita nova prezidanto. En la malferma ceremonio la kongreson salutis anstataŭanto de la ĉefministro. Oni legis kelkajn salutmesaĝojn kaj poste la membroj de la partoprenantaj landoj salutis la ĉeestantaron.

Multaj interesaj debatoj, seminarioj, prelegoj kaj aliaj altiraj programeroj okazis dum la kongresa semajno: Interkona vespero, fakaj kunsidoj, oratora konkurso, konversaciaj rondoj, aŭkcio, nacia kaj internacia vesperoj. Ni konatiĝis

kun mongola historio, arto kaj kulturo, ni provis lerni la mongolan lingvon kaj eksciis pri la Mongola E.movado kaj pri Esperanto en Unesko. Interesa kaj inspira estis elmontro de kaligrafio de la tuta Azio. Ankaŭ gejunuloj havis sian kunsidon, eĉ sport-amantoj de tablotenis kaj diversaj religiaj grupoj trovis sian lokon tie.



Partoprenantoj en la 6-a Azia Kongreso de Espeanto
Ulanbatoro (Mongolio)

Dum la tuttaga urba ekskurso ni konatiĝis kun vidindaĵoj de Ulanbatoro kaj de supre ni povis vidi tiun pli ol milionhoman metropolon.

Nacia vespero okazis en teatro ekster la kongresejo. Ni spektis tradiciajn dancojn, kantojn kaj akrobataĵojn fare de profesiuloj. Ĝi estis admirinda spektaklo de arta scipovo kaj prezentado. Same belan kaj altkvalitan prezentadon ni povis spekti en la kongresejo plenumita de infangrupo. La internacia vespero estas tradicie dediĉita al talentoj el niaj vicoj. La vespero komenciĝis per parado de ĉiuj kontribuintoj en naciaj kostumoj. Japaninoj paradis vestitaj en "jukata" vestaĵoj. Poste oni montris al ni kiel surmeti kimonojn. Prezentiĝis diversaj muzikistoj, japanoj kaj ĉinoj montris ion el sia kulturo kaj ni admire spektis tiun kulturan kalejdoskopon.



Arta Prezento dum la Azia Kongreso

La Azia kongreso estis vere impresa kaj fruktodona renkontiĝo. Ĝi liveris al esperantistoj la eblon ĝui eksterordinare belan etoson, formi novajn amikecojn kaj malkovri mirindajn regionojn en la dezerto Gobi dum la turismaj antaŭ kaj postkongresaj ofertoj. Malfacilas esprimi en unu paĝo ĉiujn nuancojn de tiu bela evento. Denove pruviĝis, ke Esperanto estas la Internacia lingvo de komprenemo kaj amikeco. Mi certas, ke ekde nun la movado tie plifortiĝis, ĉar la entuziasmo de mongolaj esperantistoj estis grandega. Por multaj el ili la kongreso estis unika sperto.

En la Azia kongreso ni harmonie esperantumis, ĝuis agrablajn eventojn kaj amikajn renkontiĝojn, kio donis al ĉiuj grandan ĝojon kaj entuziasmon daŭrigi poresperantan vojon.

Gepartoprenantoj praktikas
orientan kaligrafion

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Generalo Emilio Herrera Linares

Dum la unuaj tri jardekoj de la pasinta jarcento kelkaj eminentaj hispanaj sciencistoj lernis la internacian lingvon. Unu el ili estis Emilio HERRERA LINARES. Li naskiĝis en la jaro 1879 en la andaluza urbo Granada. Lia patro, komunikis al sia filo sian amon al la scienco. Kiel sia patro li sekvis la militistan karieron, tamen li tre baldaŭ interesiĝis al la aviado.

Tiutempe oni ekuzis la flugbalonojn kaj kiel aviadisto, Emilio Herrera partoprenis en sportaj kaj sciencaj agadoj rilate la flugbalonojn, inter ili la fama *Grand Prix* de Parizo al Ĉeĥio en la jaro 1906, kie li atingis la duan premion kaj konsekvence grandan popularecon eh Hispanio.

Sed, li ne nur flugis per balonoj, li fariĝis aviadil-piloto kaj li estis la unua aviadisto kiu superflugis la Ĝibraltaran Markolon en la jaro 1914. Pro tio li ricevis grandajn honorojn, ĉi-foje el la propra reĝo Alfonso la 13-a. Li ankaŭ interesiĝis pri matematikaj kaj teorifizikaj aferoj, li estis unu el la unuaj enkondukantoj en Hispanion de la teorio de la relativeco de Einstein, kun kiu li intertraktis okaze de la vizito de la fama germana profesoro al Madrido en la jaro 1913.



Generalo
EMILIO HERRERA LINARES

Dum tiuj jaroj li planis la ekfunkciigon de flugbalonan linion inter Seviljo kaj Bonaero, kio fine ne sukcesis pro financaj kaŭzoj. Li partoprenis en la jaro 1928 la unuan transatlantikan vojaĝon per zepelino el Germanio ĝis Novjorko.

Kiam la monarkio ĉesis kiel politika sistemo en Hispanio en la jaro 1931 kaj alvenis do, la Respubliko li estis politike suspektata de la nova reĝimo pro sia rilato al la reĝo Alfonso la 13-a, tamen li ĵuris fidelecon al la ĵus naskita reĝimo kaj eĉ oni nomumis lin hispana delegito en la Internacia Konferenco pri Malarmado, kiel kunlaboranto de la diploma

Salvador de Madariaga. Li daŭrigis siajn scienciajn esplorojn, li eĉ planis vojaĝon en la stratosferon per malfermita balono. Jam antaŭe la fama franca Picard estis vojaĝinta pere fermita balono, tamen Emilio Herrera planis gravan avancon, li uzus malfermitan balonkorbon, kiu permesus pli ekzaktajn mezurojn. Tio postulus la uzon de speciala skafandro, kiun Emilio Herrera mem elpensis kaj ekkonstruis. La ascendon oni planis por la monato oktobro de 1936, sed en la monato julio eksplodis la hispana milito kaj la projekto fiaskis.

filo Emilio, kiu servis en la respublikana armeo kiel piloto.

La fino de la milito trafis lin en Sudameriko okaze de oficiala vojaĝo. Poste, li revenis en Parizon. Emilio Herrera ekkunlaboris tiam en la helpo al la hispanaj rifuĝintoj kaj en la organizado de la ekzilaj asocioj, kulturaj kaj politikaj. Tiel, li ricevis la postenon de ministro de la hispana respublika registaro en la ekzilo.

Li kunlaboris en la Franca Astronaŭtika Instituto, ĝis kiam direktoro simpatianta al la generalo



Anglalingva ĵurnalo parolas pri la projekto de Emilio Herrera vojaĝi en la stratosferon

Malgraŭ siaj konservativaj ideoj kaj siaj amik-rilatoj kun unu el la ĉefa ribelintoj Alfredo Kindelán, li neniam dubis apogi la respublikan reĝimon okaze de la ribelo de la generalo Franko kaj la armeo de Nord-Afriko. Li revenis en Madridon kaj li estis nomumita Direktoro de la Tehnikaj Servoj de la Aviado, tie li atingis la gradon de generalo. Dum la milito, okaze de aviadil-batalo, mortis lia

Franco malpermesis lian kunlaboradon en la Instituto. Post la fino de la dua mondmilito li eklaboris en UNESKO, tamen la eniro de Hispanio en ĉi tiu internacia kultura kaj scienca organizo en la jaro 1955 signifis la eksigo de Emilio Herrera. En la jaro 1960 li estis nomata ĉefo de la hispana respublika registaro en la ekzilo, reĝimo ankoraŭ agnoskata de kelkaj ŝtatoj, inter ili Meksikio kaj

Jugoslavio. Li okupis sin pri diplomaciaj klopodoj favorigi la alvenon de demokratia reĝimo en Hispanio. Pro tio, li verkis alvokojn, plenaj je fido en la libereco, al la hispanaj internaj militistoj, al la religiaj gvidantoj kaj al la plej gravaj ŝtatestroj en la tuta mondo. En tiu posteno li estis ĝis la jaro 1962. Li mortis en Ĝenevo (Svisio) en la jaro 1967, tie li loĝis kun sia filo José, fama poeto kaj romanisto.



Oficiala fotografiaĵo de Emilio Herrera Linares kiel Prezidanto de la Hispana Respublika Registaro en la ekzilo

Kiam Emilio Herrera lernis la internacian lingvon? Ne ekzistas findidaj informoj rilate kiam la generalo Herrera lernis esperanton. Tamen, en la oficiala karteratesto de la jaro 1911, konservita en la Oficiala Arĥivo, oni mencias, ke li parolis

la internacian lingvon. Do, laŭ tiu datumo li estis unu el la plej fruaj pioniroj en Hispanio. En la jaro 1925 Emilio Herrera, kune kun aliaj elstaraj hispanaj sciencistoj, ankaŭ parolantoj de nia lingvo, kiel Leonardo Torres Quevedo kaj Vicente Inglada, ĉeestis en Parizo la Internacian Konferencon por la Aplikado de Esperanto.

En la jaro 1929 li partoprenis en la hispana kongreso de Esperanto en la astura urbo Oviedo, tie li prelegis pri sia vojaĝo per zepelino el Germanio ĝis Novjorko. Poste, komence de la 30-a jardeko li estis nomumata membro de la Honora Komitato de la Instituto de Esperanto, fondita por arigi eminentajn esperantistojn ĉe la scienca aŭ arta branĉoj. Ankaŭ oni nomumis lin Honora Vicprezidanto de Hispana Esperanto-Asocio. Li propagandis la internacian lingvon en diversaj prelegoj kaj publikigis du artikolojn en popularaj revuoj, unu pri esperanto kaj la scienco kaj la alia pri la internacia lingvo kaj la aer-linioj.

Kompreneble la ekzilo malhelpis kiun ajn agado favore al esperanto fare de la generalo Herrera. Tamen, ĉe la Oficiala Arĥivo de la Ekzilita Respublika Registaro troviĝas korespondaĵo en esperanto inter la generalo Herrera kaj ekzilitaj samideanoj en Meksikio, precipe kun Emilio Hazan kaj kun la kordova fama esperantisto Francisco Azorín Izquierdo. Ĉi tiu mem sendis al li gratul-leteron en esperanto okaze de la nomumo de Emilio Herrera kiel prezidanto de la respublika registaro en la jaro 1960. Krome, ekzistas leteroj adresitaj al UNESKO, kie li

laboris dum multaj jaroj por danki la oficialajn deklarojn de ĉi tiu internacia kultura organizo favore al esperanto.

Post la reakiro de demokratia reĝimo en Hispanio la figuro de Emilio Herrera Linares malrapide komencis iĝi pli konata. Oni kreis la Fondaĵo "Emilio Herrera" kaj AENA, la hispana organizo por aer-navigado, staris premion kun la nomo de ĉi tiu elstara andaluza esperantisto. Okaze de la rehejmigo de liaj postmortaj restaĵoj li estis omaĝita en sia naskiĝurbo Granada.

Do, utilu ĉi tiuj paĝoj kaj la altvaloraj esploroj de nia samideano José Antonio DEL BARRIO, troveblaj ĉe <http://www.delbarrio.eu/herrerauni.htm>, el kiu ĉi tiu artikolo prenis preskaŭ ĉiujn datumojn, por diskonigi ĉi tiun honestan kaj fidelan hispanon, kiu ĉiam estis favora al la uzo de la internacia lingvo, kiun li konis kaj defendis.



En la jaro 1993 okazis en Granada la rehejmigo kaj definitiva entombigo de la postmortaj restaĵoj de la generalo Emilio Herrera Linares. Ceestis la Prezidanto de la Portugala Respubliko, S-ro Mario Soares, granda amiko de Emilio Herrera, kaj la tiama Prezidanto de la Andaluza Registaro, S-ro Manuel Chaves.

Turismi en ... LINARES

Norde de Andaluzio, en la provinco Jaeno, troviĝas granda urbo kun pli ol 60.000 enloĝantoj, kerno de industria kaj komerca zono, temas pri Linares. Ĝi situas tuj apud la aŭtoŝoseo Madrido-Kadizo kaj ĝi ankaŭ estas atingebla pere de trajno. Do, vizito al Linares ne nur estas ebla, ankaŭ temas pri granda plezuro.

La plej antikvaj restaĵoj trovitaj en Linares datiĝas en la Bronz-Epoko, sed la origino de la urbo troviĝas en la ibera urbo *Kastulo*, kiu atingis grandan famon pro sia ekonomia, komerca kaj terkultura riĉeco. Grekoj kaj fenicoj alvenis en Kastulon, kaj poste la urbo estis konkerata de kartagoj kaj romianoj. Kiam la araboj alvenis en la Iberan Duoninsulon, la romia Kastulo fariĝis *Kastuluna*. Tie oni konstruis kastelon kie okazis lukto inter la araba emiro Abderahamano kaj la antaŭa emiro Jusuf al-Fihri. La kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkleris la urbon en la jaro 1227.

Meze de la 16-a jarcento la urbo ĝuis ekonomian renaskiĝon dank'al la pligrandigo de la enloĝantaro. Tiutempe Linares estis tipa urbo konstruita ĉirkaŭ preĝejo, kastelo kaj monaĥejoj, apude loĝis la kavaliroj kaj la pastroj kaj ĉe la ĉirkaŭantaj kvartaloj loĝis la normala popolo, kies ĉefa agado estis la terkulturado.



Blazono de LINARES

Kiel okazis en la ceteraj vilaĝoj de la jaena provinco, ankaŭ Linares malriĉiĝis dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Tamen, jam en la 19-a jarcento Linares ĝuas grandan transformiĝon, la ekspluado de plumbaj minejoj konvertis Linares en riĉegan industrian kaj komercan urbon. La 6.000 enloĝantoj de la jaro 1849 fariĝis 36.000 en 1877. Oni konstruis fervojon kaj nova teknologio alvenis en la urbo por faciligi la ministajn laborojn.

En la jaro 1875 la reĝo Alfonso la 12-a donas al Linares la titolon de "Urbo". Aperis tiam novaj kvartaloj, oni konstruis rektliniajn avenuojn, novajn parkojn, hospitalon kaj komence de la 20-a jarcento starigis komercaj kaj bankaj konstruaĵoj, tute similaj al tiuj de aliaj gravaj urboj, ĉefe tiuj de la valencia regiono.

Nuntempe jam elĉerpiĝis la minajn riĉaĵojn de la urbo, kvankam la ministra industrio, kaj ĉefe la fumo-tuboj kaj min-turoj, ankoraŭ estas videblaj ĉe la linaresa pejzaĝo. La nuntempa ekonomio baziĝas en la industrio kaj iomete en la terkulturado. La aŭtomobila entrepreno *Santana* estas la motoro de la ekonomia vivo de la urbo.



Aŭtomobil-industrio *SANTANA*
en Linares

Monumentoj.-

Hospitalo de la Markizoj de Linares.

Okaze de la mina disvolviĝo de la urbo dum la dua duono de la 19-a

jarcento, oni starigis diversajn publikajn konstruaĵojn. Inter ili belega hospitalo konstruita en la jaro 1917 laŭ la modernisma stilo. Oni uzis ruĝajn brikojn en la faŝado, kronita pere de alta pinto. Ene de ĝi troviĝas la maŭzoleo de la Markizoj de Linares.



Preĝejo Santa María la Mayor.

En la 13-a jarcento, sur praa islama moskeo, oni starigis kristanan preĝejon laŭ gotika stilo. Dum la 16-a jarcento oni decidis rekonstrui tie novan kaj pli grandan preĝejon. La arkitekto estis Andrés de Vandelvira, la fama konstruisto de la Jaena Katedralo. Do, oni modifis la preĝejon, ĉi-foje laŭ la renasenca stilo. Tamen la manko da monaj rimedoj malebligis la finan rekonstruon de la preĝejo. Tio kaŭzis, ke la nuntempa preĝejo dediĉita al la Virgulino Maria estas belega kuniĝo de arkitektaj stiloj. Dum la 18-a jarcento oni starigis altan okflankan turon, kie oni instalas la "horloĝon de la urbo".

Fuente del Pizar.

Oni rakontas, ke en la 16-a jarcento rajdanta kavaliro pasis tra ĉi tiu loko. La tereno cedis kiam la ĉevalo kuris kaj ĝiaj piedoj restis senmovaj ene de la tero. La kavaliro pruvis liberigi la beston kaj kiam li sukcesis, tuj akvo ekfluis el la tero. Ĝis nuntempe la akvo ne ĉesis elflui. Jen la legenda origino de la *Fuente del Pizar*, tio estas "La Fonto de la Pied-Spuro", tamen la reala origino baziĝas en la ekzisto de romia akvedukto kondukanta la akvon al la antikva *Castulo*.

La Min-levatoro.

Linares estis dum la 19-a jarcento kaj ankaŭ dum granda parto de la 20-a, mina urbo. Hodiaŭ la plumbaj minejoj ne estas plu aktivaj, tamen Linares ne povas forgesi tiujn laboristojn kaj tiujn entreprenojn kiuj tiom helpis la ekonomian kaj socian disvolviĝon de la urbo. Pro tio la Urbdomo decidis rekuperi unu el tiuj min-levatoroj ekzistantaj en la minejoj kaj starigi ĝin meze de placo. Videblas sur la kovrilo de ĉi tiu numero la min-levatoro.

Casa Muniĉión.

Konstruita en la jaro 1775. Dum la napoleona milito ĝi utilis kiel municimagazeno kaj nuntempe ĝi estas administracia oficejo. Sur belega niĉo super la enir-pordo aperas Sankta Barbara, patronino de la ministoj.

Gastronomio

La linaresa gastronomio estas simila al tiu de la ceteraj vilaĝoj en la provinco Jaeno. Do, la elir-punkto por la preparado de multaj kuirajoj estas la oliv-oleo, tre utila por bonbustigi salatojn kaj stufajojn. Oni devas elstari ankaŭ la olivon kiel apetitigaĵo. Multaj en la tipaj kuirajoj havas araban bazon, tiel la *gacha*, la *migas*, la *gazpaĉo*, la *ajo-blanco*, la *andrajos* kaj la *pipirana*. Kompreneble, oni ne povas forgesi la tipajn ministajn kuirajojn, kiel la terpomoj kun moruo, la terpomoj kun papriko kaj la *remojn*, salato ellaborita kun oranĝoj, moruo, olivoj, cepo kaj oliv-oleo. La plej tipa deserto estas la *perolo*, ellaborita kun maronoj, prunoj kaj anizo.

Festoj

Foiro de Sankta Aŭgusteno

La plej grava festo en Linares estas la foiro honore al Sankta Aŭgusteno, patrono de la urbo. Okazas fine de la monato aŭgusto. Kiel ĉiuj aliaj andaluzaj foiroj, ĉi tiu komencis kiel renkontiĝo de brutar-bredistoj por vendi kaj aĉeti brutaron, sed nuntempe temas pri ĝenerala foiro kie abundas logaĝoj kaj budoj, kie oni trinkas kaj dancas. Dum ĉi tiu aŭgusta foiro okazas famaj taŭrbataloj.



Enirejo de la Linaresa Foiro
Jaro 2007

Majaj Krucoj

Komence de la monato majo oni starigas florajn krucojn ĉe la plej tipaj placoj kaj stratoj en Linares. Apude ĉiam estas eble manĝi tipajn kuirajojn kaj trinki.



Preĝejo de la Virgulino de *Linarejos*
Patronino de la urbo

Pasko

Kvankam esence, la linaresa pasko estas tute simila al ĉiuj aliaj religiaj paskaj festoj de la andaluzaj vilaĝoj, kelkaj aferoj ĝi diferencas de ili. Ekzemple ĉe la muzik-bandoj defilantaj antaŭ la religiaj figuroj ariĝas eĉ pli ol cent muzikistoj ludantaj ne nur religian aŭ marŝan muzikon, sed ankaŭ famajn filmajn son-bendojn.

Venont-numere

TURISMI en ...

EL PUERTO DE SANTA MARIA (Kadizo)

KRUCVORTENIGMO

	a	b	c	ĉ	d	e
1						
2						
3						
4						
5						
6						
7						
8						

1. (Plurale) Ago de iu kiu asertas, ke li kapablas superi la asertanton en konkurso. 2. Ne ligita al io alia; disigita de aliaj. 3. (Inverse) Deflankiĝo de la ĝusta vojo. 4. Konsonanto / (sen la lasta vokalo) Prefikso uzata antaŭ unuoj, kun signifo de miliardono. 5. Tuŝo per lipoj por esprimi amon / Vokalo. 6. Organa korpo, produktata de la inoj de diversaj klasoj de animaloj enhavanta ĝermon de estonta samspeca animalo / (Inverse) Persona pronomo. 7. Akcepto aŭ saluto per favoraj krioj. 8. Konsonanto / (Plurale) Posesiva Pronomo.

a. Prepozicio uzata por rilatigi kun iliaj komplementoj la vortojn / (Sen la lasta vokalo) Aŭstralia mamulo. b. (Inverse kaj adverbe) En grupoj de kvin.

c. (Sen la lasta vokalo) Ago de tiu kiu kaŭzas, ke io konkreta estiĝu / (Sen la lasta vokalo) Likvigado de solida substanco, miksante ĝin kun likvaĵo.

d. Azia ŝtato / (Inverse) Nedifina adjektivo, signifanta "de tute ne difinita speco". e. (Inverse) Maniero, kiel per la verkoj de la homo esprimiĝas lia percepto de la belo / (Inverse) Havi koran inklinon al iu. e. Enloĝantoj de la

andaluza provinco kie okazas la 15-a Andaluza Kongreso de Esperanto.

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La Sankta Vizaĝo

Kristina tradicio asertas, ke kiam Jesuo marŝis en la Kalvarion kun peza kruco sur siajn ŝultrojn, virino nomita Veronika purigis lian vizaĝon malpurigita tiam per sango kaj ŝvito. Mirakle, la vizaĝo de Jesuo stampiĝis en la tol-peco uzita de la virino.

Nenia tutcerta biblia fundamento troviĝas pri ĉi tiu rakonto, tamen dum jarcentoj la kristanoj memoris ĉi tion kiam oni memoris dumpaske la Kalvarian Vojon de Kristo. Ankaŭ, en Jerusalemo, stariĝas kolono montranta la ekzaktan lokon kie Veronika purigis la vizaĝon de Jesuo.

Tradicie oni kredas, ke la tolon kie stampiĝis la vizaĝo de Jesuo gardis la unuaj Apostoloj kaj jam en Romo, Petro, la kristana apostolo konsiderata kiel la unua Papo, donacis la relikvon al Eŭfrasio, unu el la sep junaj kristanoj senditaj de Petro mem por kristanigi la Iberan Duoninsulon. Ĉar jaenano, Eŭfrasio venis en la urbon kaj li fariĝis la unua episkopo de Jaeno, kaj apud li ĉiam troviĝis la kristan relikvon. Dum la islama invado de la Ibera Duoninsulo la Sanktan Vizaĝon gardis la kristanoj, ĝis kiam en la jaro 1246 la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon, kaj li ricevis la relikvon dankesprime. Laŭdire ekzistis dokumentoj certigantaj la



La Sankta Vizaĝo
en Jaeno

aŭtentikan devenon de la relikvo, tamen ili malaperis kiam en la jaro 1368 la islamoj reatakis la urbon kaj detruis la arkivon de la kristana preĝejo.

La reĝo Ferdinando portis apud li la relikvon dum la konkero de la urbo Seviljo. En la jaro 1252 li mortis kaj la nova episkopo de Jaeno, Nicolas de Biedma, revenigis la Sanktan Vizaĝon en Jaenon. Ekde tiam multaj kristanoj pilgrime venis en la urbon por vidi kaj preĝi apud la relikvo. Tio favoris ankaŭ la fakto, ke kelkaj Papaj buleoj promesis la pardonon de la pekoj de tiuj kiuj irus Jaenon por vidi la Sanktan

Pro la granda amaso da pilgrimantoj estis necese konstrui sufiĉe grandan katedralon. Tiel en la jaro 1494 oni ekstarigis unu el la plej belaj katedraloj en Hispanio, tiu de Jaeno, kiu utilis kiel modelo de aliaj katedraloj starigitaj en la amerika kontinento.

Ekde tiam la relikvon de la Sankta Vizaĝo oni gardis ene de kofro kun sep ŝlosiloj en la katedralo de Jaeno, kvankam la relikvo malaperis dum la intercivitana milito, sed feliĉe ĝi denove aperis ene de valizo kun aliaj riĉaĵoj ĉe kvartalo de Parizo. En la jaro 1940 ĝi denove venis en Jaenon.



Katedralo de Jaeno
Konstruita por gardi belegan relikvon

Sed, ĉu ĉi tiu relikvo vere estas la vizaĝo de Jesuo? Nu, kiel dirite, sur la Biblio aperas nenian diraĵon pri la ago plenumita de Veronika, eĉ lastatempe ĉi tiu epizodo malaperis el la Kalvaria Vojo, memorata ĉiujare dumpaske ĉe la katolikaj preĝejoj.

Rilate la relikvon mem, la tolo kie supozeble stampiĝis la vizaĝo de Jesuo aperas tranĉita laŭ la konturo de la vizaĝo. Oni algluis ĝin sur riĉa ora lignaĵo kaj ĉio estas enkadrigita ene de kadro plena je juveloj.

Laŭ informo redaktita de tri prentistoj en la 18-a jarcento, do ellaborita se la uzo de la nuntempaj teknikaj rimedoj, neniuj penik-tuŝoj aperas sur la bildo, escepte ĉe la palsupra parto de la vizaĝo, pli malpli sur la barbo, kie aperas kelkaj retuŝoj.

Do, ekzistas nenia senduba pruvo rilate la aŭtentikan devenon de la relikvo, tio signifas, ke oni ne povas certigi, ke ĝi estas la vera vizaĝo de Jesuo. Tamen en la urbo Jaeno, historie, neniuj dubis pri tio, kaj eĉ la ekzisto de la relikvo mem, konata kiel la Sankta Vizaĝo, donis kromnomon al la provinco, ĉar Jaeno estas konata kiel la Sankta Regno.

La relikvon oni povas vidi dumpaske, okaze de la memoro de la krucumo de Jesuo dum la Paska Vendredo, kaj kvankam, laŭ dirite, oni ne povas certigi la aŭtentikecon de la relikvo, ĝia propra ekzisto, kaj ĝia

Andaluza

Kuirarto

PAGELO LAŬ LA STILO DE LA URBO ROTA

Ĉe la vilaĝoj situantaj tuj apud la maro troviĝas ne nur la plej bonaj fiŝoj, sed ankaŭ la plej bona maniero prepari ilin. La andaluzaj dom-mastrinoj de tiuj urboj kuiris la fiŝojn kaptitaj, kaj akompane al ili, uzis la fruktojn atingitaj de nia tero. Poste tiuj kuiradoj eniris en la restoracioj kaj tiel ni ĉiuj povas gustumi tiujn gastronomiajn trezorojn troveblaj antaŭ kelkaj jardekoj nur en la privataj andaluzaj kuirejoj.

Unu el tiuj kuir-trezoro estas la *pagelo laŭ la stilo de Rota*, vilaĝo en la provinco Kadizo, kvankam ĉi tiu kuirado troviĝas jam ĉe preskaŭ ĉiuj andaluzaj restoracioj, kaj ne nur en tiuj de Rota aŭ de apudaj vilaĝoj.

Jen la ingredientoj necesaj por 6 personoj:

- 3 kilogramoj de la fiŝo pagelo.
- ½ kilogramo da cepoj.
- 3 verdaj paprikoj.
- 4 tomatoj.
- 100 gramoj da faruno.
- 75 gramoj da sukero.
- ¼ litro da jereza vino.
- 1 blanka papriko.
- 2 kuleroj da oliv-oleo.
- Salo.



Kaj jen la ingredientoj por prepari la buljonon:

- La kapo de la pagelo.
- 1 tomato.
- 1 granda cepo.
- 1 karoto.
- ½ litro da akvo.
- 2 branĉetoj de celerio.
- 1 branĉo de laŭro.
- 2 kuleretoj de origano.
- Akvo (malgranda vaso)
- Salo

Jen la preparado:

1) Purigu la pagelon kaj tranĉu ĝin laŭ fileoj. Gardu la kapon de la fiŝo por prepari poste la buljonon.

2) Ni preparu la fiŝ-buljonon. Metu ĉiujn ingredientojn supre menciitaj por prepari la buljonon. La tutaĵo devas boli dum 45 minutoj. Poste oni devas filtri ĝin kaj rezervi ½ litron de la buljono por posta uzado.

3) Raspu la tomatojn. Gardu ilin por posta uzado.

4) Tranĉu la cepojn kaj la paprikojn laŭ juliana tranĉ-stilo.

5) Verŝu en paton du kulerojn da oliv-oleo, kuiru lante la cepojn kaj la paprikojn ĵus tranĉitaj. Rostigetu ilin, poste aldonu la tomatojn ĵus raspitaj. Aldonu salon kaj sukeron.

6) Fritu leĝere la tutaĵon.

7) Ene de kaserolo metu la pagelon fileigitan, aldonu al ĝi la salon kaj la paprikon. Kovru la fileojn kun faruno. Metu ilin sur la tutaĵo de la paŝo 6-a.

8) Verŝu la jerezan vinon. La pagelo tiam devas resti dum 5 minutoj ene de pato sur la fajro.

9) Post 5 minutoj, kaj ankoraŭ ene de pato sur la fajro, aldonu la buljonon.

10) Metu ĉi tiun tutaĵon ene de la forno dum kelkaj minutoj.

ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: aeu@esperantoandalucia.org
Jara Kotizo 20 € pagebla ĉe:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Via nomo.
- Afero: *Kotizo 2010*

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.

Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ni metas je la dispono de la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jenajn verkojn eldonitaj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

PLATERO KAJ MI



Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo de poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon. Tradukis Miguel Gutiérrez Adúriz.

Prezo: 8 eŭroj

Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituis la restarigon de la pura tragedio sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almerio, dum nupta ceremonio. Tradukis: Miguel Fernández

Prezo: 6 eŭroj

SANGA NUPTO



Vizitu la kompletan libro-servon de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉe:
<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/p/libroservo-servicio-de-libros.html>



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

*Je la servo de la disvastigo de la internacia lingvo
 en nia lando.*

FLAMENKO

La ministaj kantaĵoj

Meze de la 19-a jarcento aperis nova branĉo ene de la flamenka kantado, temis pri la ministaj kantaĵoj. Dum tiuj jaroj ministoj iris de loko en lokon por labori en la minaj zonoj de Andaluzio kaj Murcio, tie kie aperis novaj minaj tavoloj. La plej grava temo de tiuj kantaĵoj, kvankam ne la sola temo, estis la malbonaj labor-kondiĉoj, la manko da mono kaj la danĝeroj ekzistantaj en la minista laboro.



Festivalo de Flamenkaj Ministaj Kantaĵoj
La Unión (Murcio)

Temas ĉefe pri tre mallongaj kantaĵoj kaj, eble pro tio, la teksto, do la mesaĝo lanĉita, estas gravega en ĉi tiu flamenka kantaĵo. La lokoj kie oni ekaŭdis la ministajn kantaĵojn estis tie kie ekzistis minejoj, tiel en Linareso, Almerio kaj en Murcio. Pro tio ĉi tiuj novaj kantaĵoj baziĝis sur aliaj jam ekzistantaj en tiuj zonoj. Tamen, ĝi posedas specialajn karakterojn. La kantaĵo dividiĝas en tri partoj, en la meza triono la kantisto laŭtigas sian voĉon, detruante tiel la monotonecon kiu estas propra de aliaj flamenkaj kantaĵoj. Sed sendube, la plej bela kaj eĉ la plej malfacile kantebla parto estas la lasta triono, kiam la kantisto elkrias la lastajn strofojn senhalte kaj preskaŭ senspire.

Jen la plej konataj stiloj de la flamenka minista kantado:

- **Taranta:** temas pri la unua, kaj laŭ kelkaj fakuloj asertas pri la sola, minista kantaĵo. Ĝi devenas de la almeriaj fandangoj, kvankam ĝi poste etendiĝis tra aliaj zonoj, tiel estas eble trovi la *taranta* de Linareso, la *taranta* de La Unión en Murcio, ktp. Temas pri kuraĝa kantaĵo kie la kantisto moldulas dolĉe sian voĉon.
- **Minera:** kvankam oni ne konas ekzakte ĝian originon, oni asertas, ke ĝi devenas de la kantaĵoj faritaj de la ministoj voje en la laborejon.
- **Cartagenera:** ĝi estas la evoluo de la fandango kantita en Kartageno.

Post la ĉeso de la mina produktado en Andaluzio kaj Murcio meze de la pasinta jarcento, ĉi tiu flamenka kantaĵo preskaŭ malaperis. En la jaro 1961 oni ekorganizis en la vilaĝo *La Unión* (Murcio) festivalon de flamenkaj ministaj kantaĵoj. Ĉi tiu festivalo, okazanta jam dum 50 jaroj, fariĝis la plej grava flamenka festo, kaj kvankam la plej gravaj flamenkaj kantistoj kaj gitaristoj partoprenis kaj atingis premiojn, ankaŭ atingis grandajn sukcesojn amatoraj kantistoj kiuj iris en la vilaĝo *La Unión* kun la admiro de tiuj kiuj iras en lokon kie la plej pura flamenka arto regas.

*Mi volas trovi fortojn sed mi ne povas;
mi sentas la fridan morton.
ne lasu min, mia Dio,
ĉar restas alia dinamita kartuĉo
inter la rubaĵoj perdita.*

*Kie estas la laborestro
de la minejo kie mi laboras.
Kie estas la laborestro
ĉar al li hieraŭ mi diris ke,
se li ne plialtigas la salajron
mi al la minejo ne plu iros.*

ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA DE LA ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO

Convocatoria

Como presidente de la Asociación Andaluza de Esperanto / Andalucía Esperanto-Unuiĝo (AEU), convoco a todos los miembros de esta asociación a participar en la Asamblea General Ordinaria, que se celebrará el día 31 de octubre de 2010, a las 16,00 hrs. en la Sala Úbeda del Albergue Inturjoven & SPA de Jaén, sito en calle Borja s/n, Jaén.

Orden del Día:

- 1.- Lectura y aprobación, si procede, del acta de la reunión anterior.
- 2.- Estado de Cuentas al 31 de octubre de 2010.
- 3.- Presupuesto de ingresos y gastos para el año 2011.
- 4.- Boletín, revista y blog de la Asociación.
- 5.- Participación de AEU en la futura Andaluza Esperanto-Domo.
- 6.- Ruegos y preguntas.

Málaga, 29 de septiembre de 2010

Firmado: Ángel Arquillos López, Presidente de la Asociación Andaluza de Esperanto / Andalucía Esperanto-Unuiĝo (AEU).

AUTORIZACION

Autorizo a:

Miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto / Andalucía Esperanto-Unuiĝo (AEU) para que me represente y vote en mi nombre las propuestas que se presenten en la Asamblea General Ordinaria, que se celebrara en el Albergue Inturjoven & SPA de Jaén el día 31 de octubre de 2010.

Nombre y firma del socio que autoriza:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López

Sekretario: Julio Herrero Segura

Kasistino: María Dolores Torres Mateo

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga


E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



15-a

Andaluza Kongreso de Esperanto

Jaeno, 30-a/31-a oktobro

2010